

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 5/1986 ★ Kr 8,50



La gejunula danc- kaj kantgrupo de Kroscienko en suda Pollando vere kontribuis al la varma kaj festa etoso dum la kongreso en Örebro.

Fotis: Bernd Lindquist.



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till Esperanto Centro.

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-
bundet

Adress: EsperantoCentro

Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,

Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng.
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1986.



SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-
pero)

Västermov. 19, 732 00 Arboga,
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom

(kansliet, medlemsfrågor)

Oxelv. 53, 138 00 Älta

tel 08-773 40 24

Kassör: Börje Andersson

Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde

tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha

Andréasson, (SEF-årskongresser)

PI 2265, 425 00 Hisings Kärra

tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin

(turnéer, bibliotek)

Ringv. 11 B, 579 00 Högsby

tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Rohdin

(massmedia)

Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,

tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldo Vedin

Jordbrogatan 57

603 64 Norrköping

tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin

(massmedia)

Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,

tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andréasson

(utbildning, nordiskt samarbete)

Södra Rörum, 242 00 Hörby

tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt

Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga tel

0589-155 31

Utgivningsdatum för *La Espero* 1986: ca 31/1, 28/2, 30/3, 30/4, 15/6,
15/9, 15/10 och 30/11.

Manuskript till tidningen skall vara redaktören tillhanda senast en
månad före utgivningsdatum. Manuskripten skall vara maskinskriv-
na med dubbelt radavstånd, helst inga förkortningar. Bokstäverna
skall vara rätt övertecknade. Manuskripten skall vara av en sådan
kvalitet att en icke-esperantist direkt skall kunna sätta dem.

Annonspriser i *La Espero*:

1/1-sida

kronor 1 200

1/2-sida

kronor 725

1/4-sida

kronor 425

2 spalter x 6 cm

kronor 250

DAGS IGEN!

Om Du är direktansluten medlem och ännu
inte betalat Din avgift för 1986, så hjälper Du
oss att spara ett par kronor genom att sätta in
den på postgiro 20 12-3 utan att vi behöver
sända inbetalningskort till Dig. Fullbetalande
75 kr, ungdomsmedlem, t o m 20 år, 35 kr
och familjemedlem 25 kr.



Hur många "Esperanto-
främjare" har DU skaffat
under året?

INNEHÅLL/ENHAVO

- 60 Norda renkontiĝo
en Bengtsfors
Esperantodagen
Dankon
- 61 Suna varmeĉo, ko-
ra varmeĉo.... en
nia kongreso
- 63 ILEI jarkunsidis
- 64 La jarkunsido 1986
- 65 Kongresaj eroj...
Salutoj de UEA
Wanda Z. bofrati-
no de LL Zamenhof
- 66 La esperantistoj
lernis pri peda-
gogio en Örebro
Rezencio; Vicki
Baum
- TRA LA LANDO
- 69 Kultura Esperanto
Festivalo
Förlagets årsmöte
- 70 Estu aktiva ĉiun
tagon!
Esperanto en radio
- 71 Sangoj en la sig-
nifo de la radiko
"komput-"
- 72 Ciccanti paroĥ-
estro en Ravenna
Gajnintoj de kruc-
vortoj 3 kaj 4

Prezidanto:

Nia ĉijara kongreso en Örebro, kun amuzo kaj laboro bone miksitaj, nun estas finita. La tuta kongreso estas abunde referita de Börje Andersson kaj Ingemar Nordin en la sekvantaj paĝoj.

Sed ne estas tempo ripozi! Nun ni komencas la planadon por la jubilea kongreso en Stokholmo 10.-13. aprilo venontjare. Fakte jam kelkaj aranĝoj estas pretaj. Kiel ni sciigis vin la kongreso okazos parte en la Parlamenta Domo kun la prezidanto de la Sveda Parlamento Ingemund Bengtsson kiel inaŭgura parolanto kaj Humphrey Tonkin kiel festparolanto.

Estos jubilea kongreso en kiu ni kaptas la okazon aranĝi multajn publikajn aranĝojn, inter alie ekspoziciojn diversloke en la urbo, informadon en vendoplacoj ktp. Loka kongresa komitato, konsistanta el Anita Lindblom, Birger Viggen, Inger Hultkvist kaj Berit Postuma, laboras jam nun febre por aranĝi bonan, enhavoriĉan kongreson.

SEF-estraro

Birger Viggen eksciĝis el la estraro memvole. Li volas nun doni siajn fortojn al la jubilea kongreso kaj



al la Stokholma klubo. Ni tre bedaŭras, ĉar Birger kontribuis per multaj uzablaj ideoj kaj krome estas tre lingvoscipova kaj ni utiligis lin pri lingvaj aferoj. Ni kore dankas lin kaj esperas ke li almenaŭ estonte volas helpi nin.

Novelektita Haldo Vedin estas la prezidanto de la klubo en Norrköping. Li kaj liaj estraranoj ofte helpis la SEF-estraron diversmaniere. Do la profito eble ne estas nur unu persono sed tuta klubo estraro! Ni salutas lin kore benvenven al la estraro kaj esperas ke li sentos sin hejme en nia rondo.

La 14.-15. de junio la estraro havos 2-tagan kunsidon. Tie ni inter multaj aliaj demandoj diskutis kaj decidis pri la kunigo de komitatoj kaj pri la labordivido. Ĉar la labortaskoj estas tiom amasaj la laboro por ĉiuj estraranoj estas tre granda.

Pro tio ni volonte volas dividi unu laboron kun vi en la kluboj. Ni havas senlaborajn kapablulojn en via klubo bonvolu sciigi nin!

Karin Lindqvist

Nun baldaŭ estas tempo aliĝi al la Nordia renkontiĝo en Bengtsfors

Nur iom pli ol tri monatoj restas antaŭ la Nordia Renkontiĝo en Bengtsfors 3.-5. oktobro! Vi jam notis en la kalendaro, ĉu ne?

Ĝojiga sciigo: la prezoj malaltiĝis.

Jen:

entute	350:—
sen man- kaj litotukoj	315:—
nur loĝado kaj Ĝis-revida-kafo	170:—

La prezo inkluzivas vesperan manĝaĵon, matenmanĝojn, lunĉon, kaj ĝis-revidan kafon.

Loĝado en 4-, 5- aŭ 8-personaj kabanoj.

Por eksterlandaj gastoj, kiuj venos tra Stockholm, iros propra aŭtobuso. Loko por svedoj je ebleco. Kosto 160 kr entute.

Programo

I. Esperanto en la lernejon

- Margrete Landmark, Norvegujo, prezentas proponon de esperanta edukplano por jam edukitaj instruistoj.
- Prezentado de la Internacia Pedagogia Ekzameno (ILEĴ) kaj aliaj instruistaj edukplanoj.
- Informado pri Esperanto (diskuto)
 - al geinstruistoj
 - al gelernantoj
 - al la publiko

II. Pacedukado, internaciismo kaj Esperanto en la lernejo

- La edukada konsilisto Bengt Thelin, SÖ, prezentas la programon Pacedukado kaj internaciismo.
- Esperanto kiel parto de la altlerneja instruista kurso Pacedukado kaj internaciismo.
Diskuto kaj ev. gruplaboro.

III. Esperanto en la lernejo.

- Esperanto en la hodiaŭa lernejo
 - liberaj aktivecoj
 - libere elektita temo
 - temstudaj tagoj
- Eblecoj — deziroj — realecoj
Diskuto/gruplaboro

IV. Konkludo

★ ★ ★

Ni ankaŭ provos aranĝi kursojn por komencantoj kaj progresantoj. Notu vian intereson por partopreno en tiuj kursoj je via aliĝo! Dum la vesperoj nordaj talentoj amuzos nin kaj ankaŭ estos okazo ekskursi.

La partopreno de esperantaj instruistoj kaj informantoj estas "devo" sed la programo estas grava ankaŭ por ĉiuj aliaj esperantistoj.

Aliĝu antaŭ la 5-a de septembro per enpago de la kotizo al Sveda Esperanto Federacio, postgira konto 2012-3.

Indiku BENGTSFORS kaj ĉu vi estas vegetarano aŭ fumanto.

Koran bonvenon

Påminnelse: Esperanto- dagen den 27 september 1986

Glöm inte bort Esperantodagen!

Den sista lördagen i september med efterföljande vecka.

I år blir det den 27 september.

Men varför prata om den redan nu? Jo för nästa La Espero kommer ut i mitten av september och då är det för sent att påminna varandra.

Beställ material från EC! Tinga lokaler för utställningar och andra arrangemang!

Etablera kontakter med partners av olika slag t ex internationella föreningar, studieförbund, skolor med flera.

På kongressen i Örebro hörde vi talas om klubbar som skulle ha planeringsträffar under gemytliga former, om just Esperantodagen. Det låter väl trevligt och är säkert ett mycket effektivt sätt att förde la aktuella arbetsuppgifter och samtidigt ha trevligt.

På tal om kongressen i Örebro, ber kommittén att få tacka för alla synpunkter på informationsmaterialet. Fortfarande saknar vi dock många enkäter.

Skicka in dem till kontaktmannen — medverka och påverka vårt material. **Bernt Lindquist**

Koran dankon

pro la donacoj dum aprilo

Klubo Cent

Gerd Rodén, Malmö
Ulla Ullfors, Malmö
Åke Florbäck, Bromma
Inger Lannergård, Hede
J E Westberg, Mölle

Klubo Cent Jaroj

Ragnar Hjorth, Stockholm

Donacoj

Esperanto-Societo de Gotenburgo, 1.000:—

Helsingborgs Esperantoförening, 500:—

Suna varmecoj, kora varmecoj, pola varmecoj en nia kongreso

— Nun ĝi estas tie ĉi, la tempo pri kiu ni longe revis!

Jen la enkondukaj vortoj de LKK-ano Melita Dörr dum la inaŭguro de la 80:a Sveda Esperanto-kongreso en Örebro. Ŝi kompreneble celis ke finfine la diligente laborantaj esperantistoj en Örebro staris je sia revita ĉielo: La kongreso povis komenciĝi!

Sed la 140 partoprenantoj ankaŭ sentis alian finfine atingitan tempon. Printempo, ne, fakte vera somero, subite eksplodis ĉirkaŭ ni...

Komenciĝas esti ia tradicio ke niaj svedaj kongresoj estas verdigitaj ne nur de niaj verdaj flagoj kaj verdaj banderoloj sed ankaŭ de la unuaj verdaj folioj sur la arboj. Tiel estis en Skövde en 1984, tiel estis en Hälsingborg en 1985 — sed kiu povus imagi ke tio en mirakla abundo povis okazi en Örebro jam dum la unuaj majaj tagoj! Nia 80:a restos en nia memoro kiel la preskaŭ tropike sunbrila!

Ankaŭ juna pola varmecoj

— Ni kunportis la someron al Svedio! diris la gvidantoj de la pola dancgrupo. Povas esti — sed ili kunportis al ni ankaŭ koran varmecon kaj ĝojon.

La prezentado de la 24 knaboj kaj knabinoj en aĝoj 10-12 jaroj estis unu el la pintoj de tiu ĉi en ĉiuj aspektoj bona kaj inspira kongreso.

Multaj alilandaj gastoj

Karaj gastoj venis al la tre konvena kongresejo Olaus Petri-lernejo ankaŭ el aliaj landoj: Granda norvega grupo, finnlandanoj, italino, brito.. eĉ juna vizitanto el fora Kameruno, kvamkam li aspektis tute svede...

La ĉeesto kaj parolado de la ĝeneralsekretario de sveda Unesko-konsilantaro Anders Falk memorigis nin pri la pozitiva sinteno kiun Unesko havas vid-al-vid al esperanto.

"Interkona" kun konkurso

Jam la Interkona vespero donis al la kongresanoj bonan antaŭsen-

ton pri la tritaga kunestado en Örebro. Estis nur demando ĉu oni donos la plej grandan atenton al la babilado kun malnovaj kaj novaj amikoj aŭ al abunda kaj bongusta manĝaĵo.

Gajan konkurson inter la tabloj pri esperantologiaj demandoj gajnis "grupo Franko Luin". Kaj kiam la grupo finale konkursis inter siaj membroj Franko mem "kompreneble" fariĝis la unua.

Varma kukula frumateno

Tre malfrue multaj kongresanoj restis en tiu agrabla "Interkona". Sed ne kredu ke oni pro tio hezitis tre frue ellitiĝi la venontan matenon por Kukola frumateno!

Sep aŭtoj kun 30 kongresanoj iris al la rezervato "Oset" ĉe la elfluo de Svartån en Hjälmarén. Gvidataj de Bertil Bengtsson, Nils kaj Hans Odelholm ili ĝuis la rigardon de la birdoj kaj la restadon en la jam je la 6:a matene mirinde varma suno.

Norvega pento pri 1905...

Dumtempe la Örebro-prezidanto Erling Sundgren kun Inger Palerhag, Melita Dörr kaj aliaj helpantoj faris la lastajn preparojn por la jarkunsido de SEF. Pri ĝi Ingemar Nordin rakontas en speciala artikolo.

Post la lunĉo estis la intenco ke Andreo Pettyn el Pola Radio prelegus. Sed li estis malhelpita de gravaj taskoj en la pola esperantomovado. Plenplena estis tamen la posttagmezo:

— Ove Lindberg, prezidanto de la urba konsilantaro en Örebro, salutis la kongreson kaj priskribis la urbon.

— Elna Matland, prezidanto de la Norvega Esperantista Ligo, prezentis al la kongreso kaj varm-



Sur la podio de maldekstre: Erling Sundgren kaj Melita Dörr, LKK-anoj, Anders Falk, la ĝenerala sekretario de UNESKO-konsilantaro, Märtha Andreasson, vicprezidanto de SEF, Roland Lindblom, estrarano de UEA kaj Karin Lindquist, prezidanto de SEF.

Fotis: Berni Lindquist.



korajn kaj ŝercajn vortojn. "Mi ne estas certa ke niaj du landoj korekte agis kiam ni disiĝis en 1905. Eble estus plej bone ke ni havis unu komunan landon kun Oslo kiel ĉefurbo... Sed nun ni sentas nin kiel najbaroj en la plej bona signifo de la vorto, kaj ni kunlaboras por esperanto trans la limoj."

— Anna Alamo-Sandgren venis rekte el la KELI-jarkunveno en Götaboro proksime Kumla. Ŝi rakontis pri ĝi kaj konstatis ke KELI havas kontaktojn kun 126 landoj.

UNESKO kaj esperanto

— Anders Falk, ĝeneralsekretario de la Sveda UNESKO-konsilantaro, estis invitita paroli pri UNESKO kaj ĝia rilato al esperanto. Milito komenciĝas en la animoj de homoj, li diris. Pro tio paĉo ankaŭ devas esti konstruata tie. Li rekonis ke estas inundo de impulsoj el la angla lingvo en Svedio. Tio fakte kreas malfacilaĵojn konservi nian kulture heredon. Se ni en Svedio havas tiajn problemojn — pripensu la problemojn de malgrandaj landoj en la tria mondo.

Dum la UNESKO-konferenco en Sofio voĉdonis Islando kiel sola nordia lando por la rezolucio fa-



Kara partoprenanto estis Elna Matland, prezidanto de Norvega Esperantista Ligo.

Fotis: Bernt Lindquist.

vora al esperanto. Anders Falk klarigis la kialojn ke Svedio rezignis voĉdoni: Svedio opinias ke rezolucioj ne estas la plej bona labora metodo por atingi konkretajn rezultojn.

Li rakontis pri sia unua kontakto kun esperanto. Dum studentkunveno en Uppsala konversacio inter urbestro kaj japanaj gastoj devis esti tradukata unue al

angla lingvo kaj poste al japana. La metodo estis peza kaj ridinda. Fine la urbestro de Uppsala ekĝemis: Pripensu se ni ĉiuj povis paroli esperanton! Mi men lernis en 1927. Tuj la ĉeestanta urbestro ke Kyoto respondis ke li lernis en 1933. Poste la du urbestroj sidis longe kaj konversaciis...

Beijing-kongreso alispeca

— Roland Lindblom, estrarano de UEA, donis bildon pri esperantistaj aranĝoj. Eble estas 500 tiaj en la mondo ĉiun jaron, li diris. Beijing certe aranĝos tute alispecan mond-kongreson ol la kutimaj. La 1987:a en Varsovio estos pli festivala ol labora.

Aŭkcio donis 2900 kronojn

Pli malfrue dum sabato estis fakunvenoj kaj diskuto pri la agoj dum la jubilea jaro.

Malavare multaj esperantistoj donacis librojn kaj objektojn al la kongresa aŭkcio. La rezulto estis aĉetoj de 2900 kronoj al la SEF-kaso! Tio estis multe dank al la tre lerta kaj gaja gvidado de la aukcio. Vere profesie talenta en tiu metio estis Torsten Lund!

Polaj junuloj konkeris niajn korojn

La vespera supeo estis sekvata de amuzaj horoj. Leif Nordenstorm ludis telefonan monologon. Kvin junuloj allogis nin al la festivalo en Uppsala. Mats Landfors ludis pianon kaj fine venis unu el la kongresaj pintoj.

Jes, mirinda estis la prezentado de la dancgrupo el pola urbeto Kroskienko en la Tatra-montaro. La knaboj kaj knabinoj, vestitaj en belaj naciaj vestoj, dancis kaj kantis en bela esperanto. Precipe la malgranda fajfanto venkis ĉiujn korojn.

Stanislawa Mazierzak estis la nomo de la dancinstruisto kaj fondanto de la grupo. Stig Kinnander el Tibro dum siaj helpaj vojaĝoj al Pollando nodis la kontakton. Kerstin Rohdin aranĝis la vojaĝon.



Gejunuloj de SEJU rakontis pri sia kultura festivalo en Uppsala (legu pri tiu festivalo aliloke en la gazeto).

Fotis: Bernt Lindquist.



Melodifestivala aludo en diservo

La lasta kongresa tago komenciĝis per diservo en Betaniapreĝejo. Mats Landefors komencis per orgena muziko en la plenplena preĝejo. Agneta Järström ludis violonon. La pastoro de Betania kongreacio, Göran Tornardson, en flua esperanto bonvensalutis. Prezidanto de Sveda KELI-sekcio, Bengt Olof Nilsson, aludis al la titolo en la antaŭvespera venkinta melodio de la melodifestivalo: "Mi amas la vivon". La pola grupo el Kroskienko kantis. Leif Gunnar Nordenstorm predikis pri la vortoj "Al la frapanto estos malfermite".

Monkolekto al okulmalsanuloj donis 1360 kronojn. Elira monkolekto al la pola grupo donis 620 kronojn.

Rondveturo gaja festo

Aŭtobusaj rondveturoj ofte estas iom stereotipaj. Sed en Örebro la gvidanto Anne-Marie Forsgren transformis la ekskurson al amuza festo.

— Ni ridis preskaŭ la tutan tempon, konstatis multaj partoprenantoj. Estis vere gvidanto, kiu povis samtempe interese informi kaj gaje ŝerci.

Ĝis revido en Stokholmo!

Pri jarkunveno de Eldona Societo estis ankaŭ speciala raporto. Post ĝi restis nur la fina lunĉo en restoracio Viking. SEF-prezidanto Karin Lindquist bonvensalutis tien kaj substrekis ke estis vere brila kongreso en multaj sencoj. Vere brilas laboron faris la kongreskomitato, ŝi konstatis.

— Mi havis eblecon rigardi malantaŭ la kurtenojn kaj vidis la imponan laboron, diris Karin kaj donis al ni la nomojn de la tuta komitato: Erling Sundgren, Melita Dörr, Inger Palerhag, Ingrid Estholt, Anne-Marie Eklof, Anne-Marie Forsgren, Nils Odellholm, Alice Kruse, Isidor Lund-



La prezidanto en la klubo de Örebro Erling Sundgren transdonis la esperantan flagon al unu el la LKK-anoj de la venonta jarkongreso en Stokholmo Anita Lindblom.

Fotis: Bernt Lindquist.

mark, Ingrid Sunvisson, John Sunvisson.

Kiel danko al la Örebro-klubo Karin Lindquist donacis la novan grandan banderolon al ĝi.

Melita Dörr finparolis por la komitato, diris esperon ke la venonta kongreso en Stokholmo ankaŭ estos sukcesa kaj transdonis la kongresan flagon al la nova aranĝanto.

En la nomo de la Stockholma klubo Anita Lindblom bonvenigis al ĝia kongresejo, la parlamenta domo, dum aprilo 1987.

Kaj la kongresanoj disiĝis — al la ankoraŭ same mirinde "tropika" varmeco. Vetere varma estis la Örebro-kongreso — sed ankaŭ korvarma!

Börje Andersson

ILEI ankaŭ jarkunsidis en Örebro


La Sveda Sekcio de ILEI jarkunsidis la 3-an de majo en Örebro. Laŭ la jarraporto oni konstatas ke la granda laboro 1985 estis la organizado de la Internacia Konferenco de ILEI en Kungälv. Ĉeestis partoprenantoj de 8 landoj. Inter la gastoj oni povas mencii prof. Humphrey Tonkin, Usono; rektoro Helmut Sonnabend, FR Germanujo; s-ro Edward Symons, Belgujo kaj d-rino Catina Dazzini, Italujo. La konferenco estis sukcesa kaj fruktodona.

La jarkunsido reelektis Bertil Andreasson kiel prezidanto kaj

Jan-Olof Ahlbeck, Lars- Börje Nilsson, Ingemar Nordin kaj Ingrid Ottosson kiel estraranoj.

La ĉijara konferenco de ILEI okazos en Universitato Louvain-la-Neuve, Belgujo, 12-19 julio. Interesuloj sin turnu al la sveda sekciestro Bertil Andreasson.

Partoprenanto



Amikeco trans limoj

La jarkunsido 1986:

Decido, elekto...

En ege printempa Örebro ni kolektiĝis je la 9-a sub muziko de junulara ludantaro. Laŭ la kongresa listo de partoprenantoj ni estus 121, sed kelkdekoj pli aliĝis.

Melita Dörr bonvenigis nin al Örebro, videble kontenta pri kaj la vetero kaj la nombro de aliĝuloj.

La prezidanto Karin Lindquist salutis en la nomo de SEF kaj bonvenigis speciale la eksterlandajn gastojn: Elna Matland, norvega prezidanto, Anna kaj Odd Tangerud, Åge Melå, Åse kaj Kjell Gustavsen, Norvegio, Martti Pennanen, Finnlando, kaj Zora Luin, Italio.

La prezidanto de la sveda parlamento kaj la klubo de Umeå salutis al la konferenco letere.

En sia salutparolado Karin menciis, ke proprajn jarkunsidojn havas samtempe la instruistoj, la fervojistoj kaj la junuloj. Ŝi ankaŭ memorigis pri la jubilea jaro 1987, kiun ni honoras plej bone per fervora agado, kaj ŝi dankis la membraron por la granda emo helpi finance:

Per tio la kunsido estis malfermita, kaj ni povis elekti funkciulojn de la jarkunsido. Prezidanto Åke Blomberg, sekretario Linnea Edsenius, kontrolantoj de la protokolo Ulla Luin kaj Gunilla Sundholm.

Montriĝis, ke 34 reprezentantoj de la kluboj ĉeestis, sed montriĝis ankaŭ ke pluraj kluboj ne sendis nomojn antaŭe aŭ ne elektis anstataŭantojn, kial la prezidanto rekomendis pli bonan ordon estontece.

Raportoj La estrara jarraporto kaj la ekonomia raporto estis aprobitaj, sed pluraj kritikis la aldonon 2 pri la laboro en la kluboj kaj regionoj. Fine ili serĉanancis pli taŭgan formularon, kaj la sekretario deziris pli bonan raportadon. Post tio oni sensarĝigis la estraron.

Elektoj

En la elekto de estraro kaj aliaj funkciuloj la kunsido sekvis la proponojn de la elektoprepara komitato:

Prezidanto por unu jaro, Karin Lindquist (aplaŭdoj)

Estraranoj por du jaroj, Märta Andreasson, Haldo Wedin (nova)

Astataŭanto por du jaroj, Ingemar Nordin.

Reprezentantoj en la Sveda Esperanto-Instituto, Karin Lindquist, Åke Rhodin.

Komitatanoj A de UEA por tri jaroj, Märta Andreasson, Karin Lindquist, nova.

Elektoprepara komitato, Aino Åberg, Lisbet Andreasson, Roland Lindblom.

Revizoroj, Åke Blomberg, Bertil Bengtsson.

Proponoj

Venis kvin proponoj al la kunsido. En la unua la estraro proponis altigon de la jarkotizoj, kaj la decido iĝis laŭ estrara deziro. La kotizoj por 1987 nun estas 100 por rektaj membroj, 50 por rektaj familiaj kaj junaj membroj, 75 por klubaj membroj kaj 35 por klubaj familiaj kaj junaj membroj.

La kvar aliaj proponoj venis de la klubo en Motala. En unu la klubo proponis, ke SEF aranĝu kursojn por klubaj funkciuloj. La estraro respondis, ke la ĉefa tasko de la estraro estas informi pri esperanto, sed ĝi estas preta helpi al kluboj bezonantaj tian edukadon per ekz. regionaj kursoj.

En alia propono la klubo volas, ke la estraro informu la klubojn kaj unuopajn membrojn kielmaniere iĝi la parlamentanojn agi por enkonduki esperanton en la lernejojn. La estraro respondas i.a. ke ĝi komencis laboron pri starigo de parlamenta grupo kaj promesas ke ĝi donos al la kluboj konvenan materialon por la agado inter parlamentanoj.

En alia propono de Motala la klubo petas ke la estraro kontaktu la Superan Estraron de edukado (SÖ) pri komunaj kursoj por instruistoj. En la respondo de la estraro ĝi informas pri la nuntempa maniero aranĝi kursojn por instruistoj kaj pri la malfacilaĵo ricevi spacon inter aliaj temoj en la edukado de instruistoj. Ĝi ankaŭ atentigas pri la nova temo "Pacedukado kaj internaciaj temoj" kaj proponas mem, ke la propono estu transdonita al la Sveda Esperanto-Instituto kio, fariĝis la decido de la kunsido.

En sia lasta propono la klubo de Motala deziras matrikulon de la SEF-anoj, kaj proponas elekton de komitato kiu esploru la temon.

La estraro respondas ke ne ĉiuj membroj volas esti enmatrikulitaj. Ankaŭ estas eble por ĉiuj ricevi de Esperanto centro kajerton kun nomoj de la klubaj kontaktuloj kaj regionaj respondeculoj. Eble oni povus pligrandigi la enhavon de tiu kajereto, kial la estraro volas rifuzi la proponon pri matrikulo. Tion decidis la kunsido.

Agadplanoj 1986-1987

Poste sekvis traktado de la agadplanoj por 1986-87, kiujn Karin Lindquist prezentis. Pri la laboro de diversaj komitatoj raportis

mallonge Bernt Lindquist pri la informa grupo, Åke Rhodin pri la enketo, Märta Andreasson pri la Instituto, Birger Viggen pri la librogrupo, Ingemar Nordin pri la libro-heredaĵo post Paul Nylén.

Kiel kutime kelkaj meritoplenaj membroj estis honoritaj. Honora membro fariĝis Agda Olsson kaj Lennart Åberg, ambaŭ el Göteborg, kaj la prezidanto dankis Birger Viggen, kiu nun memvole forlasis la estraron por aliaj gravaj taskoj en nia laboro.

Fine la prezidanto fermis la kunsidon kaj ĉiuj kune kantis la himnon.

Ingemar Nordin

Kongresaj eroj...

Al la kurso por kursgvidantoj la unuan kongresan tagon en Örebro aliĝis 12 lernantoj. Harold Brown kaj Bertil Andreasson gvidis kaj havis bonan impreson pri la estontaj kursgvidantoj.

Eldona Societo transportis al la libroserva tablo en la kongreso abundan kaj allogan librostokon. Anita Lindblom kaj Leif Gunnar Nordenstorm vendis por pli ol 4000 kronoj.

Najbaro al ili estis la SEF-kasisto, kiu vendis afiŝojn, broŝurojn, la pacnumeron de La Espero kaj alian informmaterialon por 2267 kronoj.

Post la parolado de Anders Falk, ĝeneralsekretario de Sveda UNESKO-konsilantaro, estis ebleco fari demandojn al li.

Karin Lindquist proponis al UNESKO provi unu lingvon anstataŭ ses por ŝpari monon. Anders Falk respondis ke UNESKO

en tiu okazo dum prepara periodo havus sep lingvojn...

Tiu konstato igis Ingemar Nordin atentigi ke en la salono sidas personoj, kiuj komencis lerni esperanton antaŭ kvar monatoj sed jam komprenas la lingvon. La reprezentantoj en UNESKO certe estas same lertaj kaj ne bezonas pli longan preparan tempon!

Ulla Luin demandis ĉu Sveda UNESKO-konsilantaro ion faras por kontraŭi la influon de la angla lingvo pri kio Anders Falk atentigis en sia parolado. Falk respondis ke oni interalie aranĝas seminariojn pri la eblecoj konservi ŝian propran kulturon. (Por la plej multaj kongresanoj tiu respondo vere ne estis tre kontentiga).

Kiel kutime nia granda kritikanto Chris B. Voss el Västerås sendis artikolojn al la kongresurbaj gazetoj kun lingvoreformaj proponoj. Nerikes Allehanda publikigis grandformatan artikolon. Kion diri? Ho, pli bone ke esperanto iamaniere estas atentigita ol, estas silento? Tamen la Örebro-gazetoj ankaŭ sufiĉe skribis pri la kongreso.

Börje Andersson

Venis saluto al la partoprenantoj de la 80-a jarkongreso en Örebro — iom malfrue kaj pro tio ni peras ĝin tra la gazeto:

Estimataj gekongresanoj! En la nomo de Universala Esperanto-Asocio mi elkore salutas ĉiujn partoprenantojn de via kongreso. Bonvolu akcepti miajn sincerajn gratulojn okaze de via jubileo. Mi esperas, ke ankaŭ la 80-a Sveda Esperanto-Kongreso multe kontribuos al la evoluo de la enlanda kaj internacia movado. Mi deziras al vi fruktodonajn debatojn kaj agrablan restadon en Örebro. Mi esperas revidi multajn el vi en la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, en Pekino.

Kun multaj salutoj via
Flora Szabo-Felső
ĝen-sekr. de UEA

Wanda Z. bofratino de LL Zamenhof!

En la lasta numero de "La Espero" skribas Valborg Hansson Seger ke dum la unua postmilita kongreso en Bern 1947 ŝi renkontis doktorinon Wanda Zamenhof "filino de doktoro Ludoviko Zamenhof". Tio ne estas korekta. Zamenhof havis tri infanojn: filon Adam kaj du filinojn — Sofia kaj Lidia. Wanda estis edzino de Adam. Post la atako de hitleranoj kontraŭ Pollando ili ĉiuj troviĝis en Varsovio. Jam en la komenca periodo de la okupado Adam estas arestita kaj pafita. Poste Sofia kaj Lidia estas murditaj. Kiel milionoj aliaj en koncentrejo Treblinka (gasumitaj). Solaj Wanda kun la filo Ludoviko sukcesis kaŝi sin kaj travivis la infernon.

Ili partoprenis la kongreson en Bern 1947. En la posta kongreso en Malmö 1948 la juna Ludoviko vizitis Svedion. Mi memoras la gajan festeton ĉe Tiberio Morariu en la tiama sidejo de SEF en Tegelbacken kie Tiberio loĝis kaj Ludoviko vigle flirtis kun tiam 17-jara Dorika Morariu...

Post nur mallonga tempo Wanda Zamenhof mortis en Varsovio en aŭtomobila akcidento. Ludoviko Zamenhof vivas nun en Parizo. Li havas du filinojn el kiuj unu kun sia edzo kaj infano loĝas en Usono. La solaj Zamenhof kiuj postvivis ĉirkaŭ Ludoviko, estas Stefan, profesoro en Los Angeles, la filo de Henriko kaj Robert, vic-profesoro en Boston, la nepo de Felikso Zamenhof. Ambaŭ ne havas idojn.

E. Rytenberg

La esperantistoj konas la historion de esperanto (kaj ankaŭ legas La Espero-n) ĉar kelkaj notis la eraron supre, inter alie ĝesinoroj Kühlmann el Danujo (redaktora noto).

La esperantistoj lernis pri pedagogio en Örebro

La pedagogia kurso en Örebro kolektis dekunu partoprenantojn. Antaŭtagmeze Bertil Andreasson gvidis. Li donis superrigardon pri diversaj metodoj instrui lingvojn ĝenerale kaj esperanton speciale. Ni ankaŭ ricevis liston pri esperantaj lernolibroj tipaj por la diversaj metodoj. Materialo por instrui per helpo de projekciilo kaj flanela tabulo estis montrataj.

Posttagmeze Harold Brown donis multajn ekzemplojn kiel oni povas paroligi la partoprenantojn en kursoj. Ni ankaŭ ricevis multajn bonajn kopiojn kun diversaj ludoj.

Dum la tago ni ankaŭ diskutis malfacilaĵojn en la laboro kun grupoj konsistantaj el personoj kun tre diversaj kondiĉoj.

Lisbet Andreasson

Vicki Baum

BAUM, Vicki: Amo kaj morto en Balio. UEA, Rotterdam 1986. 420 p.

Aĉetebla ĉe Eldona Societo, prezo: 125 kr. Venos aŭtune en la libroklubo Nova libro.

Romano de la aŭstri-devena aŭtorino, konata pro siaj priskriboj de vivkondiĉoj en la belarta formo. La romano pritraktas historiajn okazintaĵojn fine de la pasinta jarcento. Ene de rakonto pri amo kaj perforto ni renkontas du tute aliajn mondojn, tiun de la nederlandaj koloniistoj kaj, ĉefe, tiun de sudorienta kampara societo. La vivoj de la dancisto Raka kaj la kamparano Pak estas bazitaj sur longdaŭraj tradicioj. Rave la aŭtorino rakontas en distra maniero. La libro mem estas bela, kun facile legebla stilo.

TRA LA LANDO

Myrte Green först i höst!

Myrte Green från England är vår första föreläsare för i höst. Hon är här 1-20 september. Passa på att "beställa" henne, när din regionsansvarige hör av sig. Enligt "enkäten", är det mer än 30 klubbar som önskar föreläsare från något annat land!

Kerstin Rohdin

Sukcesa turneo kun infana folklora dancgrupo

La infanoj de la pola folkdancgrupo "Pieninoj", kiu lastatempe vizitis nin, nun jam revenis al siaj hejmoj en Kroscienko en la Tatra montaro en suda Pollando. Ili hejmeniris sciante, ke ĉiu ilia prezentado estis elstare sukcesa. Sed ne nur tio. Ankaŭ ili revenis portante impreson pri Svedio kaj pri la sveda popolo. De iliaj reagoj

kaj private kaj publike estas klare, ke tiu impresado estas tute pozitiva kaj ke la vizito ne nur provizis por ni ĝuegan distraĵon, sed eble eĉ pli grave, donas tre ege pozitivan kontribuon al interkompreniĝo inter la du popoloj. Eniri svedajn hejmojn, dividi la vivon de ordinara sveda familio eĉ por nur kelkaj tagoj donas multe pli ĝustan kaj longdaŭran informon ol legi librojn aŭ lerni nur teorie pri nia lando.

Mi volas tie ĉi speciale danki tiujn kiuj estis kontaktuloj kaj ĉefadministrantoj en la diversaj lokoj. La sociaestro de Höör, kiu por la tria jaro tiel malavare helpis en esperanta laboro Stig Casserstedt, akceptis la grupon en Ystad kaj aranĝis la unuajn programojn en servadomo kaj publike. Postan tagon la grupo vizitis Broby kaj Kristianstad, kie Ann-Christin Kron Dahl aranĝis programon kaj en lernejoj kaj publike. En Högsby ili prezentigis en Fröviskolan, kie Radio Kalmar faris programon kun polaj kaj svedaj infanoj. Estis du publikaj prezentadoj i a dum la printempa fajro dum Valborg. Survoje norden ili haltis en Norrköping, kie Haldo Vedin aranĝis por ili. En Karlskoga Torbjörn Löfblad faris intere-

san aranĝon sur la komerca placo kaj en la enirhalo de la malsanulejo, de kie ĉiu paciento en sia lito povis aŭskulti ilin per la interna radiodisaŭdigo. En Örebro ili dancis en tri "servad-domoj" antaŭ ol ili finis la streĉan tagon per pinta prezentado dum la SEF-kongreso, kie Åke Rohdin prizorgis ilin. Dum la matena diservo de KELI ili kantis antaŭ ol ili vojaĝis al Tibro kaj Skövde, kie ili havis prezentadojn en lernejoj kaj en Tibro publikan aranĝon en la kadro de Kulturnämnden. Tie estis la vera kialo de ilia vizito en Svedio, Stig Kinnander, kiu foje vidis ilin danci en Pollando.

Vere lia propono inviti ilin estis tute prava, ĉar ili faris plenan sukceson dum ĉiu sia prezentado, entute 20. Ĉie la grupo ricevis loĝadon kaj manĝon kaj transportkostojn kaj krome ĉ. a 8.000 kronojn en kontanta mono.

Vere mi sentas grandan ĝojon havi la okazon kunlabori kun vi ĉiuj en tiu grandega entrepreno de SEF. kaj ĝojas ke tiom da homoj havis plej pozitivan kontakton kun esperanto. Ankaŭ la eĉo en la gazetaro estis plurloke granda.

Kerstin Rohdin



Okcidenta regiono

Kunlaboro

Nordia Popola Altlernejo kaj Internacia Esperanto Kursejo

Estis subskribita protolo i.a. pri interŝanĝo de studvizitoj en Bulgario de kelkaj personoj de la Nordia Popola Altlernejo por vidi la kondiĉojn en la Esperanto-Kursejo en Pisanica. Subskribis ĝin la rektoro de la Nordia, Nils Zandhers, la ĉefdirektoro de Esperanto-Kursejo Angel Todorov kaj Märtha Andreasson por SEF, okcidenta regiono.

Estis ankaŭ konsentoj inter la rektoro kaj la Hungara Esp. asocio kaj Internacia Kultura Servo pri daŭraj kontaktoj malgraŭ de protokolo ne estis

skribata. Do la kurso vere estis fruktodona.

Interŝanĝo de lernejoj klasoj Svedio - Bulgario

Ankaŭ estis starigata protokolo pri interŝanĝaj vizitoj de klaso en Kungsbacka kaj klaso en Sofio dum la aŭtuno 1986 kaj la printempo 1987. Tiun protokolon oni poste diskutos por fiksa decido. SEF respondecos por la esperantokurso en Svedio i.a. laŭ la propono. Pli pri tiu interŝanĝo venos poste.

Märtha Andreasson

La internacia kurso en Kungälv 12-16 majo 1986

En la kurso partoprenis 52 personoj. El tiuj estis la plej multaj de diversaj lokoj en Svedio, sed venis ankaŭ 10 personoj el Bulgario, 2 el Norvegio, 1 el Hungario kaj 1 el Jugoslavio.

Kursoj kaj prelegoj

Estis kursoj en tri gradoj:

En la komencanta, kiun gvidis Anna-Maria Lange, partoprenis 10-o da personoj.

En la konversacia, kiun gvidis Oszcar Prinze el Budapeŝto, estis duoble pli multaj, do 20-o da personoj sekvis ĝin.

La pedagogia parto, kiu havis 3 diversajn gvdantojn - Ivica ŝpoljarec, Zagrebo, Ebbe Vilborg, kaj Märtha Andreasson, Gotenburgo - havis ankaŭ 10-o da partoprenantoj.

La kursoj okazis antaŭtagmeze. Posttagmeze

estis prelegoj pri Bulgario de Vladimir Deomengiev kaj Angel Todorov. Ili ankaŭ montris filmojn

kaj diablojn pri la bulgara esperantomovado kaj pri la lando mem. Ivica ŝpoljarec - Ŝtef - prelegis pri Internacia Kultura Servo en Zagrebo kaj pri la t.n. zagreba metodo instrui. Estas ampleksa laborokiu ili faras en IKS, sed la plej grava estas la ĉiujaraj Pupteatraj Festivaloj, kiujn oni aranĝos ĉijare por la 19a fojo. Ŝtefankaŭ montris belan diabliserion kun sekva parolo kaj krome filmon pri pupteatraĵoj. Estis ekskurso al la pontoj de Tjörn kun gaja, kantanta, historirakontanta aŭtobusŝoforo. Andreas Nordström tre bone gvidis la ekskurson.

Pacvespero

La programon enkondukis grupo de 7 infanoj 4-8 jaraĝaj el Kungälv, kiuj ludis etajn skeĉojn kaj kantis. Poste sekvis parolado de Cvetka Mirteva el Sofio, Bulgario, pri la pacmovado en Bulgario

kaj pri la bulgara MEM-sekcio. Vasil Odĝakov el Sofio kantis antaŭ ol Birgitta Kilborn kaj Hans Hendriksen de "La Pacmovado en Kungälv" prezentis en kia maniero ili laboras por la paco. Ili i.a. montris sonbildan bendon pri desegnaĵoj, kiujn faris infanoj en lernejoj en Kungälv pri paco kaj milito. Poste parolis Oszcar Prinze el Budapeŝto, Douglas Draper el Oslo kaj Ivica Spoljarec el Zagrebo pri paclaboro en siaj hejmlandoj kaj speciale kiel laboras la esperantomovado por la paco. Inter la paroladoj denove kantis Vasil Odĝakov. Ivica deklamis kelkajn poemojn kaj fine ni kune kantis "Venkos ni en gloro".

Märtha Andreasson

Nordokcidenta regiono

Esperantokurs på Karlskoga folkhögskola

Kursens syfte är att Du efter en vecka skall kunna använda ett erkelt språk i tal och skrift. Intersiva moment, några i vår språkstudio, kommer att blandas med lugnare uppföljningsövningar. I undervisningen vävs in moment som uttal, grammatik, ordbildning, historik och utveckling och "esperanto i dag" (press, radio, kongresser, utbyte etc).

KURSTID: Månd. 30 juni 10.00 - lörd. 5 juli kl 14.00

KURSPLATS: Karlskoga folkhögskola, Rektor Lindholms v. 23, Karlskoga.

KOSTNAD: 900:- kronor. detta pris ingår helinackorderi med logi i dubbelrum (exkl sänklinne). Tillägg för enkelrum 200:- kr. Lexikon och kursbok kostar ca 70:- kr.

ANMÄLAN insändes senast

den 20 juni till Karlskoga folkhögskola, kursverksamheten, Box 192, 691 24 Karlskoga, på bifogade blankett. Anmälningavgiften, 100:- kr, insättes samtidigt på skolans pg 13 03 56-9. Skriv "Esperanto" på talongen.


UPPLYSNINGAR: Karlskoga folkhögskola, tel. 0586-503 60. Kursledaren Lars Forsman träffas på skolan eller på tel 0586-548 11.

Norda regiono

Umeå Esperanto Klubb har haft en utställning i Umeå:s nya bibliotek, varifrån ovanstående foto är taget. Utställningen består i huvudsak av den affischserie som Esperantoförbundet framtagit. Efter Umeå ska den nu vidare till biblioteksfilialerna. Det finns också tillfälle för övriga klubbar i nordra regionen att låna den om de kontaktar Umeå Esperanto Klubb.

En reklamficka med nya korrespondenskurser finns för övrigt ständigt på central plats i huvudbiblioteket. Det finns väl också på alla bibliotek där det finns en Esperantoklubb i närheten, eller hur?

Ivar Nilsson



Esperantoutställningen i Umeå Bibliotek i april succé.
Fotis: Ivar Nilsson.

Sudorienta regiono

Rapport från Småland

Den 11 maj hade Smålands och Blekinges esperantister (åtminstone en del av dem) möte i Nybro. Vi lyssnade på Stanislaw från Szczecin som berättade om 15:e meridianens hemligheter. Tex lärde vi oss en hel massa om både Polens och Sveriges historia. Han var i Sverige en vecka som pristagare i Monda Turismos årliga pristävling.

En av Kalmar läns riksdagskvinnor deltog också i arrangemangen. Hon var mycket intresserad och positiv till esperanto och lyssnade efter kaffet med stort intresse till Harolds beskrivning av hur man ordnat Parlamenta Agado i England.

Som avslutning på kvällen diskuterade man framtida aktiviteter – framför allt på kurs och turnésidan.

Vi ska försöka få alla bibliotek i regionen eller i alla fall i Kalmar län att ordna en utställning med den nya affischserien i anslutning till Esperantodagen i september. Då ska vi också ha listor utlagda

för att få intresserade till veckoslutskurser. Vi ska också försöka att ordna offentliga föreläsningar i samarbete med skolor och andra föreningar, när de turnérande föreläsarna kommer.

En givande kväll med förhoppningsvis en del frön sådda.

Kerstin

Suda regiono

La Suda Distrikto aranĝis sian okan semajnfina kurson la 24-an kaj 25-an de majo en la popolaltlernejo de Markaryd.

Partoprenis 35 kursanoj kiuj estis dividitaj en kvar grupoj. La unua grupo konsistis el 11 komencantoj kaj estis gvidata de Lisbet Andreasson.

La dua grupo konsistis el tiuj kiuj jam pasigis la komencantan stadion. Bertil Andreasson gvidis tiun grupon. Anna-Maria Lange instruis en la tria grupo kaj la progresintan kvaran grupon gvidis Iva Åberg. Instruisto de la popolaltlernejo ankaŭ havis lecionojn pri ĝenerala interlingvistiko.

La kurso konsistis ne nur el intensaj lingvaj studoj sed ankaŭ el historia informado pri la lernejo kaj la regiono de Markaryd. Amika kunestado regis kaj kiel kutime dum la distriktaj kursoj la riĉenhava librostando vikle komercis.

Do, nova sukcesa ero en la vico de distriktaj semajnfinaj kursoj.





Kultura Esperanto Festivalo

Kultura Esperanto-Festivalo en Uppsala 16a-19a de majo fariĝis granda sukceso. Okdek kvin spektantoj el dek ses landoj preskaŭ plenigis Teatron Totem. Du radio-programoj kun dissendo de esperanta muziko kaj gazetartikoloj, i a en Expressen sciigis multajn ne-esperantistojn pri la festivalo.

La programo estis bunta kaj varia. Tomaš Plaszky el Ĉeĥoslovakio prezentis pupteatraĵojn. Ivica Špoljarec el Jugoslavio prezentis sian premiitan lumbildprogramon "27" kaj recitis poemojn. József Dinny'es, Hungario, Gianfranco Molle, Italio (gitaristoj) kaj Torbjörn Engström (pianisto) solkantis kun propra akompanado. la rokmuzikaj grupoj Persone, Svedio, kaj Amplifiki, Svedio/Danio ambaŭ tre populariĝis. La poeto Jarlo Martelmonto (Jarl Hammarberg) prezentis tekst-sonkomponaĵon. Kooperativo Verda Monto, Pilio, kaj ties membro Mi-

ra Rzadska prezentis teatraĵojn, Stefan MacGill, Hungario, distris la spektantojn per humuraĵoj. Esperantologian studrondon pri la revuo "Norda Prismo" kaj diversaj strategiĵoj de la Esperanto-movado gvidis Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, Svisio.

La celo de la festivalo estis montri ke la esperanta movado havas sian propran kulturon. Oni invitis artistojn, kiuj vere scias Esperanton, kaj kiuj mem kreis kulturaĵojn en la lingvo. Male, oni ne invitis "papagojn", homoj kiuj senkomprene ripetis lernitajn tekstojn en Esperanto.

La festivalo bone sukcesis kaj ricevis amason de laŭdo de la spektantoj, kiuj ankaŭ proponis ke ni nepre ripetu la festivalon. Tio eble okazos en 1988 en Skanio. Se vi maltrafis tiun ĉi festivalon, ne maltrafu la venontan!

Leif Nordenstorm



Torbjörn Engström, per sia lerta ludado kaj kantado sendube jam fariĝis nova stelo sur la firmamento de la esperanta kulturo.

Fotis: Leif Nordenstorm.

Förlagets årsmöte

Förlagsföreningen Esperanto upa hade sitt årsmöte i Olaus Petriskolan i Örebro, den 4 maj 1986, kl. 11.00. Till styrelseledamöter för två år valdes Franko Luin, Lenart Magnusson och Anita Lindblom. Bertil Nilsson och Åke Blomberg kvarstår. Suppleanter är Per Aarne Fritzson och Jan Milld.

Många frågor diskuterades liv-

ligt. Många menade att förlaget borde göra mer reklam, bl'a i La Espero. Styrelsen besvarade också frågor om pågående utgivningsprojekt. Ulf Ribers meddelade att han höll på att ge ut tre barnböcker i Plupp-serien på esperanto på eget förlag. Dessa kommer troligen att säljas av Förlagsföreningen i kommission.

Leif Nordenstorm



Gianfranco Molle, Italio ekde 1977 estas konata en la Esperanto-medio.

Fotis: Leif Nordenstorm.

Estu aktiva ĉiun tagon!

Nun ankaŭ vi, kara leganto, provas aparteni al la fidelaj aŭskultantoj de niaj radioprogramoj. Niaj programoj? Jes sendube ĉar el sep landoj pluraj renomaj internaciaj sendiloj disaŭdigas programojn Ĝuste por ni esperantistoj, por ni en Svedio kaj ĉiulande.

Kiel aŭskulti? Senrezerve mi respondas; Se vi ĉiutage aŭskultotos almenaŭ unu elsendon, vi baldaŭ rimarkos ĝojigan rezulton de via aktiveco. Unuavice vi ekzercas vian kapablon sekvi parolan lingvon, vi lernos novajn vortojn kaj parolturnoj de la kulturaj programeroj, vi konatiĝas kun diversaj opinioj rilate sociajn aferojn, vi larĝigos vian propran personecon. Verdire, vi riĉigas konstante vian esperantistan vivon!

Post aŭskultado vi estu afabla sendi leteron aŭ simplan poŝtkarton al la koncerna stacio. Baldaŭ vi havos agrablajn kaj tute personajn rilatojn kun "viaj" stacioj, kiuj volonte sendos siajn skribajn informojn pri programoj ktp. Vi ankaŭ povas atendi — de pluraj el la stacioj — respondojn per la eteraj ondoj en leterkêstoj, koncertoj kune bandedziroj kaj alimaniere.

Se vi hazarde mistrafas kapti elsendojn en Esperanto, vi povas telefone aŭ skribe turni vin al mi: Lennart Åberg, Box 55028, 400 53 Göteborg. Tel. 031-48 95 97.

Jen adresoj je via dispono: ne forgesu aldoni en ĉiun adreson Esperanto-Redakcio: Radio Polonia, P.K. 46, PL 00-950 Warszawa, Pollando; Radio Pekino BEIJING, Ĉino; Svisa Radio Internacia, CH -3000 Bern 15, Svislando; Aŭstria Radio Internacia — ORF, A-1136 Wien, Aŭstrio) Radio Vaticano, Piazza Pia 3,

Esperanto en radio

Ni unue indikas horaron laŭ Universal Tempo Koordinita (UTC — pli frue nomita GMT) kaj poste frekvencojn laŭ kilohercoj (kHz -p/s); parenteze ni notas ondolongojn laŭ metroj. En Centra Eŭropo (Svedio) vi devas kalkuli unu horon; en periodo de somera tempo (1986-03-30 :9-27) kalkulu du horojn. Aŭskultu regule kaj raportu ofte skribe al la radiostacioj!

ĈIUTAGE

0530—06.00 Varsovio: 1503 (200), 5995 (50,0) 6135 (48,9), 7270 (41,3)
11.00—1130 Pekino: 6955 (43,1) 9480 (31,6)
1100—1125 Varsovio: 7145 (41,2), 9525 (31,5)
1300—1330 Pekino: 11650 (25,7), 15385 (19,4)
1530—1555 Varsovio: 7285 (41,2), 9675 (31,0)
1630—1655 Varsovio: 6095 (49,2), 7285 (41,2)
1930—2000 Varsovio: 6095 (49,2), 7285 (41,2)
2000—2030 Pekino: 7470 (40,1), 9365 (32,0), 9965 (30,1)
2130—2155 Varsovio: 1503 (200), 5995 (50,0), 6095 (49,2), 7285 (41,2)
2230—2300 Pekino: 9860 (30,4), 11650 (25,7), 15385 (19,4)

LUNDE

1630—1645 Berno: 3985 (75,3), 6165 (48,7), 9535 (31,5)

MERKREDE

0115—0130 Berno: 6135 (48,9), **9725 (30,8) 9885 (30,3), 11925 (25,6), 12035 (24,9)**
0315—0330 Berno: 6135 (48,9) **9725 (30,8) 9885 (30,3), 12035 (24,9)**

I-00193 Roma, Italio; Radio Zagreb, Jurišičeva, 4. YU-41000 Zغرب, Jugoslavio; Radio roma, C.P. 320 Centro corrispondenza, I 00100 Roma, Italio.

0745—0800 Berno: 9560 (31,4) 11745 (25,5), 11905 (25,2) 15570 (19,3)

1045—1100 Berno: 11795 (25,4), 15570 (19,3), 15585 (19,2), 17830 (16,8)

1315—1330 Berno: 11905 (25,2), 11955 (25,1), 15570 (19,3), 15585 (19,2), 17830 (16,8)

1515—1530 Berno: 15430 (19,4), 15570 (19,3), 17570 (17,1), 17830 (16,8)

1715—1730 Berno: 9885 (30,3), 11955 (25,1) 12035 (24,9), 15420 (19,5), 17830 (16,8)

2215—2230 Berno: 9625 (31,2), 9885 (30,3), 12035 (24,9), 15570 (19,3)

Atentu! Grasaj ciferoj ĉi-supre indikas frekvencon de plej forta sendilo.

ĴAŬDE

0500—0515 Vatikano: 6250 (48,0), 7250 (41,4) 9755 (30,8), 11715 (25,6)

1630—1645 Berno: kiel lunde

SABATE

Berno: 8-foje kiel merkrede
1630—1645 Berno: kiel lunde
2000—2020 Romo: 7275 (41,3), 7290 (41,2), 9575 (31,3)

DIMANĈE

0530—0542 (ev. 0540-0552) Vieno: 5945 (50,5), 6000 (50,0) 6155 (48,7), 9755 (30,8), 11830 (25,4)

0945—0957 Vieno: 6000 (50,0) 6155 (48,7) 11915 (25,2).

1900—1910 Vatikano: 6190 (48,5), 6250 (48,0), 7250 (41,4) 9625 (31,2), 9645 (31,1), 11700 (25,6) 15120 (19,8).

Atentu: En festotagoj 1 majo, 14-15-16 aŭgusto, 1 novembro, 8 decembro kaj 24-25-26 decembro Vaticano elsendos kiel dimanĉe **2145—2200 Zagreb:** 1143 (262,4)



Lennart Åberg

Ŝanĝoj en la signifo de la radiko "komput-"

Bernard Golda:

Dum la pasinta jardeko fakuloj kaj laikoj pridiskutis la signifon kaj uzon de la radiko "komput-" en Esperanto. Ne estis eble decidi pri la ĝusta kaj oficialigenda nomo de la aparato, kiu estas nomata jen "komputilo", jen "komputero", jen "komputoro"(¹). En 1967 Rudolf Haferkorn(²) registris la verbon "komputi" kun la sekva difino, bazita sur la signifo, kiun Eugen Wüster donis al ĝi en la jaro 1923(³)

mezuri ian kontinuaĵon per aparato; komputi la kvanton de trafluanta gaso, likvo, elektro ktp...

Iom modifita difino aperas en **Plena Ilustrita Vortaro (PIV - 1970)**

mezuri per nombroj la kvanton de kontinua fluo aŭ la unuojn de ripetiganta fenomeno kaj adicii ilin.

La hungara komputerikisto Antal Münnich ne estis kontenta pri tiu difino de "komputi", do li decidis ŝanĝi ĝin sen konsultado kun aliaj fakuloj. Li redefinis ĝin jene(⁴).

produkti datumo(j)n, prilaborante alia(j)n datumo(j)n, laŭ algoritmo, ordinaro per aŭtomato.

Ĉar ne ĉiuj fakuloj aŭ vortaristoj akceptis tiun ŝanĝon, Rüdiger Eichholz, la direktoro de la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (TC-ISA), organizis ankoraŭ en 1976 kaj surbaze de sia interpreto de la rezultoj, tiris la konkludon, ke la ĝusta-vorto por la aparato estas "komputoro", sed de tiu la verbo estas "komputi". En eksplacis varmega kaj amara polemiko inter la komputistoj kaj la komputeristoj. Eichholz provis paciĝi ĉiujn, akceptante la verbon "komputi" kun nova, plej ĝenerala signifo(⁵)

ĝenerala termino, kiu enhavas la signifojn de nombri, kalkuli kaj komputori. Komputilo estas nespecifa termino por iu ajn komputiva ilo, ekz. abako, glitkalkulilo, kalkul-maŝino, kalkulato, komputoro.

(Slipara Vortaro)

Rezulte de tiu redifino, Eichholz devis serĉi alian vorton por esprimi la malnovan signifon de "komputi" kaj li proponis "kompti", kies etimo estas la franca *compter*. Prof. Waringhien, akceptinte la uzadon de "komputi" kaj "komputilo" laŭ la novaj difinoj de Münnich kaj lia skolo, sugestis, ke "kompti" havu la antaŭan signifon de "komputi". Tiun ŝanĝon Münnich rifuzis(⁶), argumentante, ke *compter* en la franca lingvo signifas "nombri", kaj se "kompti" signifas la samon, ĝi estos ne-bezonata sinonimo de "nombri"; male, se ĝi havas alian signifon, tiam ĝi estos "falsa amiko" por la francoj. Eichholz faris sian proponon pri la enkonduko de "kompti" en 1977, sed ĝis nun ĝi ne estas uzata, kaj kaoso regas en la terminologio.

Se ni reiras pli ol sep jardekojn, ni povas trovi, ke la radiko "komput-" havis aliajn signifojn. La plej frua registro, kiun mi sukcesis trovi estas en la angla-Esperanta vortaro de Joseph Rhodes (1908). En tiu verko la angla verbo *to compute* estas tradukita en Esperanto per "(el)kalkuli" kaj "komputi", kiu estas matematika termino(⁷). La radiko "komput-" aperas ankaŭ en kelkaj fruaj Esperantaj vortaroj eldonitaj en Francio. En la Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca de Émile Boirac (1909-1910) la substantivo "komputo" estas eklezia termino

signifanta "kalkulo de la tempoj por reguligi la eklezian kalendaron". Charles Verax en sia **Enciklopedia Vortareto Esperanta** (1910) simile difinas "komputo": "metodo, per kiu oni fiksas la datojn de la religiaj festoj", sed la verbo registrita ankaŭ en tiu ĉi vortaro kiel matematik termino, signifas "kalkuli la kiomon de kelkaj ciferoj". Ambaŭ vortaristoj referencas pli fruajn verkojn. Boirac uzas kiel fonton la **Vortaro esperanto-franca** de Emmanuel Robert, eldonita en 1910, kaj Verax ŝuldas la signifojn en sia verko al Raoul Bricard, la aŭtoro de **Matematika Terminaro kaj Krestomatiko**, kiu aperis kvin jarojn pli frue en 1905.

Oni povas trovi la fonton de la signifoj rilatantaj al la eklezia kalendaro en la semantika tereno, kiun okupas la franca verbo *comput* kaj vortoj derivitaj de ĝi, *comput* kaj *computation*. Ili rilatas al la kalkulado por fari eklezian kalendaron, havantan la nefiksajn religiajn festotagojn. *Computiste* estas (⁸) kalendaristo, faranto de ekleziaj kalendaroj, kaj (⁹) vatikana funkciulo, kiu traktas la enspezojn de la papa fisko. Ĉar la fruaj Esperantaj vortaroj eldonitaj en Francio donas al "komputo" signifon temantan pri kalkulado por la religia kalendaro, estas probable, ke la etimo de "komput" en tiu kunteksto estas la *francacomput*.

Kvankam la uzo de "komput-" en religia kunteksto ne kaŭzas miskomprenon, tiu vortuzo ne plu estas aktuala. Versajne ĝi estis nur propono de franclingvaj vor-

taristoj ĉirkaŭ 1910 kaj poste neniam estis uzata.

Notoj

1. La plej gravaj dokumentoj pri tiu ĉi demando estis republikigitaj de Rüdiger Eichholz en **Akademias Studoj**, 1983 pĝ. 146-179, Bailieboro, Ontario, Kanada.

2. RUDOLF HAFERKORN. 1967. **Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto**. Cardiff, Ontario, Kanado.

3. Eugen WÜSTER. 1923 **Enkiklopedia vortaro Esperanto-germana**. Leipzig.

4. Antal MÜNNICH. 1978. Pri kelkaj bazaj terminoj de komputado-respondado kaj rifuto (tie!) al s-ro Rüdiger Eichholz. **Sciencaj Komunikadoj**, pĝ 18; **Akademias Studoj**, 1983, pĝ 166.

5. Rüdiger EICHHOLZ. 1977. **Cirkulero TC 77/2**, 1977-12-29, pĝ 1; **Akademias Studoj**, 1983, pĝ 158.

6. Antal MÜNNICH. 1979. **Cirkulero TC 79/2**, letero datita 1978-12-04; **Akademias Studoj**, 1983, pĝ 171.

7. Joseph Rhodés. 1908. **The English-Esperanto Dictionary**. London.

Ciccanti paroĥestro en Ravenna

Internacie bonkonata esperantisto, pastro Albino Ciccanti, ek de 16a de februaro estas paroĥestro en paroĥo San Pier Damiano. En Svedio pastro Ciccanti havas multajn geamikojn, kiuj bone memoras lin el 70-aj jaroj, kiam li vizitis nin por prelegi en Esperanto pri diversaj temoj. Nun certe multaj de liaj konatoj volas gratuli lin okaze de lia nova, grava ofico en Ravenna, tiu centro de arto kaj eklezia vivo. Jen lia adreso: Via Capodistria 7, I-48100 Ravenna, Italio.

Mirinde estas, ke jam 1970a okaze de internacia kongreso de Fervojistoj esperantistaj en Rimini, oni ekskursis Al Raveno, kie oni inaŭguris Esperantostaton. Lige al tio pastro Ciccanti celebris la Sanktan Meson en Esperanto ĝuste en la preĝejo de S. Pier Damiano, kie li nun deĵoras kiel paroĥestro. Certe li plene meritas sian novan oficon pro siaj multaj talentoj.

Inter siaj multlokaj prelegoj en Svedio, pastro Ciccanti faris du

seriojn de prelegoj en okcidenta Svedio (gubernioj Göteborg-Bohus, Halland, Skaraborg kaj Älvsborg), unu monaton aŭtune 1978 kaj unu monaton printempe 1979 – entute 73 prelegoj en variaj prelegoj (16), en gimnazioj (41), popolaj altlernejoj (14) universitatoj (2). Ceteraj prezentadoj okazis en preĝejoj, ĉe eklezia junularo Rotarianoj, ĉe klerigaj asocioj kaj celebrado de Sankta Meso en Itala kapelo en Gotenburgo. Krome Ciccanti renkontiĝis kun tiama episkopo Helge Brattgård de la Skara-diocezo en kunsido de 20 prepostoj. La publiko en la nomitaj 73 prelegoj nombris 4 200 personojn.

Ni svedaj esperantistoj elkore gratulas nian amikon Albino Ciccanti kaj deziras al li forton kaj bonan sanon por daŭrigi sian agadon. Ni salutas laŭ Sankta Francisko de Asizo: PACON kaj BONON.

Lennart Åberg

"Krucvortoj" nr 3 kaj 4

Jen la gajnintoj de krucvorto 3:

- 1) Karin Sehlstedt
Siljansvägen 79
121 70 JOHANNESHOV
- 2) Sven Svensson
Ängsgatan 12
562 00 NORRAHAMMAR
- 3) Inger Lannergård
Sävsjövägen
820 93 HEDE

kaj de krucvorto 4:

- 1) Tyra Digervall
Geologgatan 14
981 31 KIRUNA
- 2) Gunnar Birgersson
Holländaregatan 19
561 39 HUSKVARNA
- 3) Majken Svensson
Köpenhamnsvägen 48 C; VI
271 71 MALMÖ

Etaj premioj venos!
Koran gratulon

